MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

12

DECEMBRO 2018 Kol. 404/34

xxxx

Konferenco de ĈEA en Benešov

okazis 12.-14.10.2018 en agrikultura mezlernejo kun partopreno de 65 esperantistoj el multaj lokoj de nia lando, inkluzive de kelkaj eksterlandaj gastoj el Slovakio, Germanio, Francio kaj Pollando.

Malgraŭ komencaj problemoj (malsaniĝis muzikanto kaj kuiristinoj, fermita kastelo Jemniŝtě okupita de filma stabo, ĉesis ekzisti Societo de senioroj, ktp. ktp), feliĉe ĉio sufiĉe sukcese solviĝis kaj la partoprenantoj de la konferenco alvenis.

La unuan antaŭvesperon, vendrede, gvidis niaj du lertaj lektorinoj Jindřiška Drahotová kaj Mirka Tomečková paroligajn rondetojn por komencantoj – mi vidis, ke partoprenis sufiĉe multaj „lernantoj“. En alia angulo de la manĝejo organizis junularo de ĈEJ (Junularo) atelieron ORIGAMI kaj ankoraŭ en plua parto de la manĝejo nia interrreta fakulo Miro Hruška konsilis al la interesiĝantoj pri retaj aferoj.

Post la vespermanĝo okazis societa vespero kun rakontado pri Esperanto-eventoj de la fino de la jaro 2017 ĝis oktobro 2018.

Oni prezentis multajn interesajn kaj vizitindajn E-organizaĵojn, eĉ kun lumbildoj kaj mallongaj videofilmoj.

Sabate antaŭtagmeze pasis la konferenco en bela lerneja aŭditorio: oni traktis precipe en Esperanto, interalie, pri la financa stato de ĈEA kaj malaltiĝanta membrobazo, pri raporto de UEA – membro-kotizoj ktp., pri agado de E-kluboj. Oni menciis la solenaĵon okaze de la dekjariĝo de la E-muzeo en Svitavy. Oni donis informon ankaŭ pri ciferecigado, pri Esperanto en ĉeĥaj radio kaj televid-elsendoj en la ĉeĥa kaj eksterlandaj presaĵoj, en retkomunikoj kaj Ipernity.

Oni prezentis la lokon de la venonta E-kongreso 2019 – ĝi okazos en la urbo Brno, kie antaŭ 50 jaroj, printempe de la jaro 1969, estis fondita la nuna ĈEA.

Post bongusta tagmanĝo, la ĉeestantoj komune fotografiĝis kaj poste okazis busa eskskurso al la kastelo Vrchotovy Janovice. La konferencanoj, dividitaj en du grupojn, trarigardis la belajn interierojn de la kastelo kaj antaŭ aŭ post la trarigardo ili povis refreŝiĝi en restoracia ĝardeneto per glaciaĵo, kafo, biero … aŭ promeni en bela, multkolora, ĉarma aŭtuna parko. Vespere okazis societa amuzo: bela juna paro de danclernejo prezentis sian dancoarton kaj poste oni amuziĝis ĉe muziko de elektro-piano kaj kantado en kontrea (country) stilo. La ĉeestantoj (ĉu dancante aŭ ne) ĝuis la belajn melodiojn.

Sekvis bunta tombolo kun multaj objektoj kudritaj, trikitaj, kroĉetitaj t. e. memfaritaj de aninoj de la benešova E-klubo.

Sufiĉe multajn donacojn por la tombolo ni ricevis de Jana Křížková, por kio ni tre dankas al ŝi. Dum ambaŭ vesperoj, vendrede kaj sabate, Paul Pavlíček, redaktoro de Verda Stacio, faris filmraportojn, intervjuojn ktp. por youtube. La filmetojn vi povas spekti ĉe la adreso:
https://www.youtube.com/c/11pably/live .
Ĉe la adreso www.esperanto.cz estas trovebla ankaŭ filmeto pri la urbo Benešov, kies komenton en Esperanto tre bele prezentas Vladimír Türk.

Dimanĉe antaŭtagmeze ni veturis per urba trajneto al la proksima kastelo Konopiště kaj tiuj, kiuj deziris prefere vidi la urbon, restis sidantaj en la vagonareto kaj per ĝi ili traveturis la stratojn de Benešov. Mi supozas, ke la ekskurso tre plaĉis al ĉiuj.
Krom aliaj agrablaĵoj dum niaj konferencaj tagoj regis bela, varma vetero. Ankoraŭ mi volus danki al ĉiuj volontuloj, kiuj helpis por la sukceso de la konferenco.

Leonka Chaloupková

La seminario en Skokovy

En Ĉeĥa paradizo okazis la 48a seminario de „seniora grupo“ de fidelaj amikoj de la pensiono ESPERO – Rondeto de doktoro Jozefo Hradil. Li bedaŭrinde forpasis en la jaro 2008 aŭtune. La pensiono de tiam iom kadukiĝas.
La aranĝo okazis de la 19-a ĝis la 23-a de septembro 2018. Matena gimnastiko antaŭ la matenmanĝo havis aspekton Esperanto-jogan. Antaŭtagmeza konversacio kaj instruado povis

okazi subĉiele en amika rondo. Ni utiligis la novaperintan libreton „Legaĵoj kun verda birdo“.

Valora estis prelego de samideano Kazdera el la urbo Liberec pri „Interhelpo“. Ni promesis lian prelegon ciferecigi kaj publikigi. Aliaj prelegoj okazis ankaŭ vespere kaj enhavis utilajn informojn por novaj adeptoj, ekzemple kiel funkcias E-asocioj, rakontadoj pri travivaĵoj dum kongresoj, pri la historio de la loko Skokovy, aŭskultado de muziko „No Problem“ ktp. Interesaj estis manlaboroj, kiujn gvidis la okjara nepino de Eva Pánková – Bětka por siaj „avinoj“. Sur la foto bedaŭrinde ne estas ĉiuj partoprenantoj. Jindřiška Drahotová

La 26-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo, Salou 29. 9. - 6.10. 2018

La kvinan kaj la lastan fojon ni ĝuis la Internacian Semajnon en Salou ĉe la Ora Marbordo. Salou estas grava turisma urbo, situanta je 10 km sude de *Tarragona*. Ĝi estis fondita en la 6a jarcento antaŭ Kristo kaj posedas kelkajn belajn plaĝojn. Proksime troviĝas granda amuz-parko, *Port Aventura*. Al la aranĝo aliĝis 100 geesperantistoj el 12 landoj. Ni loĝis en la ekstrema parto de la urbo en la hotelo *Best Negresco*, kie en la jaro 1989-a okazis la 41-a fervojista kongreso. Post la alveno kaj disdono de dokumentoj ni eksciis pri la semajna programo kaj la organizantoj parolis pri la estonto de la ŝatataj Semajnoj, kiuj ne plu okazos en la Kataluna parto de



Hispanio.
La dimanĉan inaŭguron ĉeestis la urbestro de Salou, s-ro Pere Granados, kiu kore bonvenigis nin kaj deziris sukceson al la evento. Poste ni fotiĝis kun li ĉe la hotela naĝbaseno. Posttagmeze ni promenis laŭlonge de diversaj plaĝoj ĝis la centro de la urbo. Vespere okazis en gaja etoso interkonatiĝo kun ŝaŭmvino kaj kelkaj dolĉaĵoj kaj aliaj manĝaĵetoj. Bele kostumita hispana paro dancis *zarzuela* kaj Rosa Lopez muzik-ritme klakis per kastanjetoj.
Dum la Semajno sekvis programeroj, diskutrondoj pri diversaj temoj, interesaj prelegoj, aljuĝo de la Premio Ada Sikorska, deklamado de poeziaĵoj, komuna kantado kaj videa prezento pri kataluna folk-loro kaj kutimoj. Posttag-meze estis tempo por banado aŭ promenado en naturo ĉe la maro.

Inter la prelegoj necesas substreki tiun de Pere Navarro Rosines pri: "Ĉu vi scias, ke nia manĝo venas de la suno?" Li klarigis la bioĥemian procezon en plantoj, algoj kaj kelkaj bakterioj, pri pigmentoj kaj ĝenerale pri fotosintezo. Ĉio estis ilustrita per multaj bildoj.
Barbara Pietrzak el Pollando prelegis pri esperantista komu-nikado, pri famaj esperantistoj, pri klopodoj ĉe Unesko kaj aliaj interesaĵoj el Esperantio. Zita Blaust el Danio parolis pri siaj spertoj kaj impresoj dum la 12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo kaj pri la hinda virino *Sindutaj Sankal*.
Javier Alcalde prelegis kaj diskutis pri pacismo, pri la roloj de esperantistoj dum la granda milito (1914-1918), pri la influo de la Esperanto-movado. Lia prelego titoliĝis "Antaŭ unu jarcento -

Esperanto kaj la unua mondmilito".
Abel Montagut prezentis "La poemo de Utnoa kaj la Diluvo". Luz Vázquez gvidis rondon pri kulturtemoj, esencaj trajtoj de la Esperanto-kulturo. Dalia Pileckienè parolis pri stereotipa pensmaniero en nia vivo el psikologia vidpunkto. En kelkaj grupoj ni plenumis diversajn taskojn. Ángel Argilos gvidis rondon pri deklamado de poezio en Esperanto. La ĉi-jara Premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Barbara Pietrzak, kiu multe laboras por Esperanto. Ŝi persone konis Ada´-n kaj ili komune laboris por Esperanto.
Kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje ni ĝuis "Peĉakuĉon". Ĝi estas serio da bildoj kun komentarioj de la aŭtoroj. Ni eksciis pri tornilo, pri la irlanda historio kaj pri Patriko, pri vojaĝo laŭ la usona vojo 66a, pri radioaktiveco kaj atomoj. Ni spektis kastelojn en Dordonjo kaj tridimensiajn bildojn el Koreio.

Okazis duontaga ekskurso al la proksima urbo *Reus*, kie ni promenis ĝis la centra parto de la urbo. Tie ni povis vidi kaj admiri de ekstere la *Casa Navás*. Poste ni vizitis "Gaŭdi Centron" spektante filmon kaj diversajn eksponaĵojn. En *Centre de lectura* ni vizitis ampleksan bibliotekon kun multaj libroj kaj galerion de bildoj. La tuttaga ekskurso direktiĝis al apudmara urbeto *Sitges*. Tie ni vizitis muzeojn *Maricel* kaj *Cau Ferrat* (domo-ateliero de la kataluna verkisto kaj pentristo *Santiago Rusiñol*, kiu tie vivis). Ekde la fino de la 18a jarcento ĝis la komenco de la 19a jarcento tie establiĝis konstanta komercado kun amerikaj kolonioj.
Impona estas la preĝejo Sankta Bartolomeo kaj Sankta Tekla el la deksepa jarcento. En la urbocentro ni promenis tra mallarĝaj pavimitaj stratetoj kaj admiris kelkajn luksajn domojn. La urbon

oni nomas hispana *Saint Tropez*. Ekde la jaro 1967a ĉi tie regule okazas internaciaj film-festivaloj. En *Sitges* troviĝas domo *Bacardi* transformita en muzeon, kie oni povas gustumi la produktojn *Bacardi*. En la jaro 1814a tie naskiĝis *Facundo Bacardí Massó*, kiu en la jaro 1830a migris al Kubo kaj tie estis inventinta la faman rumon. *Bacardi* estas entrepreno de alkoholaĵoj, kiu ekestis en *Santiago de Cuba* en 1862a. Ĝi estas unu el la plej vendataj alkoholaĵoj en la mondo.
Denove kaj lastfoje ni kun entuziasmo aŭskultis "habaneran" muzikgrupon *Montjüic* dum la jaŭda vespero, kie ne mankis dolĉa ruma trinkaĵo *Cremat*. Vendrede ni adiaŭis per kantado gvidata de Jeanne Draime kaj Martine Demouy. Finiĝis agrabla 26-a Internacia Semajno, restas nur belaj rememoroj. En Andaluzio ekestos nova Semajno, organizos ĝin spertaj malaganoj. Liba Gabalda

El la redakcio:

Ni esperis, ke niaj legantoj ŝatas partopreni literaturajn konkursojn, precipe ĉe la kristnaska tempo. Ni atendis ĝis la dato la 10-a de novembro, nur poste venis unu sola artikolo.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.